Kontaktu la redakcion: kunfluo@proton.me + 31 6 19 46 48 37 aŭ @kunfluo

# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

n-ro 3 hodiaŭ: 27 °C morgaŭ: 23 °C lundo, la 7-a de julio 2025


fotis Gražvydas Jurgelevičius

## BET-59 solene malfermita

En ĉeesto de la unua vicprezidanto de la Sejmo, Juozas Olekas, okazis hieraŭ posttagmeze la solena inaŭguro de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Inter la honoraj gastoj estis ankaŭ membro de la Eŭropa Parlamento Vytenis Povilas Andriukaitis, kiu laŭtlegis sian paroladon en perfekta Esperanto. Lin sekvis – same en Esperanto – Audrys Antanaitis, prezidanto de Litovia Ĵurnalista Asocio kaj ankaŭ partoprenanto de BET. Pliaj Esperantaj podianoj estis Amri Wandel (nome de UEA), István Szabolcs (EEU), Ulrich Brandenburg (germana ambasadoro), Margarita Želve (Latvia Esperanto-Asocio) kaj Biruta Rozenfelde (organizanto de la unua BET en 1959). Post la solena inaŭguro okazis koncerto de la koruso Gintaras, kiun sekvis luksa akcepto de la Rektoro de la Universitato. Li mem bedaŭrinde ne povis ĉeesti la inaŭguron pro aliaj devoj. Al BET-59 aliĝis ĝis nun entute 277 personoj el 32 landoj.

## HODIAŬA PROGRAMO

| | **Lundo, la 7-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: “Interkultura komunikado per Esperanto” (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de prof. Mark Fettes: “Lingva demokratio, en nedemokratia modo” (*Senata salono*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Aida Čižikaitė: “Koncize pri la litova lingvo” (*aŭditorio 306*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de prof. Amri Wandel pri astrofiziko (*Senata salono*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Daŭrigo de SUS de AIS. Prelego de prof. Karlo Spinola: “Fascinitaj de la steloj. Ekde Sumero ĝis James Webb serĉantaj nian lokon en la kosmo” (*Senata salono*) |

**daŭrigo sur p. 3**




Estimataj Kongresanoj de BET-59, Estas ĉiam plezuro kaj privilegio por prezidanto de UEA saluti la renkontiĝon de BET, ĉi-jare la 59-an de la internacie konataj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Universala Esperanto-Asocio ĝojas aŭspicii eventon kiu atestas pri la vigleco de la regiona agado kaj specife tiu de la gastiganta lando. Revenis la vico de Litovio tri jarojn post kiam mi vizitis BET-56 kun mia edzino, kie en la havenurbo Klaipėda ni ĝuis sammonate semajnon kiu montris modelon de ĝuinda festado de la Esperanto-kulturo, kun sciencaj kaj aliaj edukaj programoj kies organizado ripetiĝas por daŭre klerigi la ĉeestantojn.
En la nova Strategia Laborplano de UEA reliefiĝas la bezono plifortigi kaj la Landajn Asociojn kaj la reciprokan kunlaboradon en regionaj planoj kaj renkontiĝoj. Ju pli ni sukcesas kunlabori por atentigi la publikon kaj decidofarantojn pri la valoro de nia lingvo, samtempe ĝuante la kunestadon kiun faciligas nia lingvo, des pli ni povas proksimigi la popolojn al la paca kunvivado kiun ili meritas. Ni ne nur sopiru, sed espereme insistu ke la natura evoluo de la homaro forigu konfliktojn kaj perfortadon favore al komunikado kiu per sia justa egaleco spegulas la plej altajn aspirojn de la homaro.
Vi havos la okazon konatiĝi kun Kaŭno, sidejo de la Litova Esperanto-Asocio kaj centro de agado por nia lingvo, historie markita kun stratnomo de la familio Zamenhof. Via amase vizitata evento garantias la daŭrigon de tiu laŭdinda tradicio, kiu kunportas la torĉon de tiu paciga donaco de D-ro Zamenhof pri kiu ni ĉiuj rajtas fieri. Kondiĉe ke ni mem dediĉos nin al progresigo de lia klarvida ideo loke, regione, kaj transnacie. Kiel? Interalie per individua subteno de la ĉiam kreskanta agado de UEA, kuniganta individuan kaj regionan agadon. Nepre adaptiĝanta al la bezonoj de mondo kiu ne havas alternativon ol evoluo en ĉiam pli pacan direkton, per rekta komunikado inter individuoj kaj popoloj. Por tion atingi, ni lernu labori preter la limoj de nacia politiko, generacioj, kulturaj kaj kondutaj diferencoj, konfliktaj personaj opinioj — kaj ĝuu tiun diversecon!
Profitu la donacojn de viaj gastprelegantoj, kaj montru al la mondo ke ni scias celtrafe kaj ĝoje kunpilgrimi al celo kiu benos la tutan homaron.

**Duncan Charters**
Prezidanto de UEA



Karaj partoprenantoj de BET-59!
Bonvenon al nia tradicia esperantista aranĝo, kiu ĉi-jare okazas en la dua urbo de Litovio, Kaunas – la ĉefurbo de Esperanto-movado en Litovio. Urbo, kie Esperanto-movado ĉiam estis aktiva. Ne laste ankaŭ pro tio, ke Kaunas estas forte ligita kun apero de Esperanto ĝenerale kaj kun la vivo de Zamenhofa familio konkrete. Baltiaj Esperanto-Tagoj estas unika fenomeno en la internacia Esperanto-movado funkcianta jam dum pli ol 60 jaroj. Aperinte en 1959 dank' al la iniciato de tiutempaj junaj esperantistoj- studentoj kiel modesta renkontiĝo, ĝi tuj evoluis al amasa kaj tiutempe preskaŭ sola esperantista aranĝo en la tuta tiutempa Sovetunio kaj post sendependiĝo de Baltaj ŝtatoj ĝi ne nur konservis sian tradicion kaj identecon, sed laŭ geografio de la partoprenantoj ĝi etendiĝis tra la tuta Eŭropo kaj eĉ pli foren. BET kiel historia fenomeno eltenis influon de la tempo kaj de la esencaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, ĉar ĝi en si mem havas iaspecan internan forton altirantan multajn homojn kaj post vasta internaciiĝo ĝi ekhavis multajn novajn kolorojn kaj aspektojn. La ĉi-jara BET vere elstaras pro tre riĉa, interesa, diversflanka, streĉa kaj intensa programo, en kiu ĉiu povas trovi ion interesan por si. Litovio nur antaŭ iom pli ol 35 jaroj revenis al la politika mondmapo de egalrajtaj nacioj kaj ŝtatoj. Tamen Litovio havas longan hstorion, antikvan lingvon, unikan kulturon, belegan naturon. Mi esperas, ke partoprenantoj de BET-59 ĉion tion ekvidos kaj ekspertos senpere kaj revenos hejmen pli riĉaj kulture kaj spirite. Des pli, ke ni estas en la urbo, kie Esperanto kaj bela ideo de interpopola kunlaboro kaj amikeco ne estas fremda.
Bovenon al Litovio! Bonvenon al Kaunas!
Belegajn, interesajn kaj utilajn tagojn!

**Povilas Jegorovas**
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio




## Pri la komunaj tagmanĝoj

Ekde hodiaŭ okazos la komunaj organizitaj tagmanĝoj en la restoracio **Bistronomė** (adreso: Laisvės al. 37). Atentu komenchoron – kontrolu ĝin sur via kupono kaj venu akurate!

## Aĵoj perditaj, aĵoj trovitaj

Ĉu vi perdis ion? Aŭ ĉu vi eble trovis ion? Forgesitaj okulvitroj, pluvombrelo, notlibro aŭ via poŝtelefono... Bonvolu anonci vin ĉe la akceptejo, kie la perditaĵo havas la ŝancon retrovi sian posedanton – aŭ inverse!

## Informoj pri BET-59 en la amaskomunikiloj

Ankoraŭ antaŭ ol BET-59 komenciĝis, pri la aranĝo jam raportis diversaj litovaj amaskomunikiloj, inter ili la tutlanda semajna revuo *Lietuvos aidas* (Eĥo de Litovio), kiu publikigis ampleksan artikolon de Povilas Jegorovas. Pri BET-59 informis ankaŭ la novaĵretejoj *Mano kraštas*, *Kas vyksta Kaune*, *Mokslo Lietuva* kaj la retejo de Litovia Ĵurnalista Asocio.


LIETUVOS AIDAS

2025 07 03 – 09 Nr. 25 AKTUALIJOS 11

**BALTIJOS ESPERANTININKŲ DIENOS KAUNE**

Povilas JEGOROVAS
Lietuvos esperantininkų sąjungos Valdybos pirmininkas

Penkiasdešimtdevintąjį kartą Baltijos šalių esperantininkai renkasi į savo tradicines kasmetines tarptautines dienas. Šį kartą jas organizuoja ne tik Lietuvos esperantininkų sąjunga, bet ir Vytauto Didžiojo universitetas bei Pasaulio lietuvių centras. Lietuvos esperantininkų sąjunga su Vytauto Didžiojo universitetu 2023 m. yra pasirašiusi bendradarbiavimo sutartį. Renginys vyksta Vytauto Didžiojo universitete liepos 5-13 dienomis.

Renginio globėjas – Lietuvos Respublikos Seimo pirmininko pirmasis pavaduotojas Juozas OLEKAS.

Renginį taip pat remia Europos parlamento narys Vytenis Povilas ANDRIUKAITIS.

Renginiui globą suteikė ir Pasaulinė esperantininkų sąjunga bei Europos esperantininkų sąjunga.

Sveikinimus 59-osioms Baltijos esperantininkų dienoms atsiuntė Lietuvos Respublikos užsienio reikalų ministras Kęstutis BUDRYS,

Baltijos esperantininkų dienos vyksta kasmet nuo 1959 metų paeiliui Latvijoje, Estijoje ir Lietuvoje. Renginys iš tarybiniais laikais buvusios taip vadinamos Pabaltijo respublikų esperantininkų stovyklos išaugo į visos Europos ir netgi Pasaulio esperantininkų festivalį, nors ir išlaikė savo tradicinį pavadinimą ir savo tradicijas. Šiais metais 59-osiose Baltijos esperantininkų dienose dalyvauja per 300 esperantininkų iš 32 Europos ir kitų pasaulio šalių. Įtempta tarptautinė padėtis ir karas Ukrainoje žymiai sumažino planuotų dalyvių skaičių. Būtume pasiekę rekordinį šiame šimtmetyje dalyvių skaičių.

Dienų programa yra tradicinė, tačiau labai intensyvi, intelektuali, įvairiapusė ir turininga. Vyks tradicinis vasaros universitetas, kuriame paskaitas skaitys žymūs mokslininkai esperantininkai. Kaune vyks tarptautinės Sanmarino mokslų akademijos 41-oji universitetinė sesija. Atskiru leidiniu yra išleisti šios sesijos pranešimai. Vyks net keli teminiai paskaitų ciklai. Prof. Mark FETTES iš Kanados skaitys paskaitų ciklą apie kalbinius procesus šiuolaikiniame pasaulyje. Jau minėtas Jeruzalės universiteto prof. Amri WANDEL perskaitys trijų pranešimų

Italijos, Vokietijos, Škotijos, Belgijos, Lietuvos. Viso bus perskaityta per 50 pranešimų.

Baltijos esperantininkų dalyviai tai pat bus supažindinti su Lietuvos istorija, kultūra, kalba, tautinėmis šventėmis ir tradicijomis. Pranešimų ciklą šia tematika perskaitys Lietuvos sveikatos mokslų universiteto lektorė Aida ČIŽIKAITĖ.

Norintys svečiai iš užsienio šalių taip pat bus supažindinti su lietuvių kalbos pradmenimis. Tai padarys Vilniaus universiteto studentė Severija Marija BANAITYTĖ.

Vyks įvairaus lygio Esperanto kalbos kursai. Iš viso bus penkios grupės – juos ves dėstytojai iš Lenkijos, Izraelio, Belgijos, Lietuvos.

Bus pristatyta eilė naujų šiais metais išleistų knygų esperanto kalba.

Esperantininkų organizacijų vadovai ir aktyvistai aptars esperantininkų sąjūdžio problemas ir perspektyvas Baltijos regione, Esperanto kalbos situaciją Europos Sąjungoje, kur kalbų problematikai šiuo metu yra skiriamas didelis dėmesys.

Šį kartą bus labai gausi ir turtinga kultūrinė programa. Dienų dalyviams koncertuos mišrus choras "Gintaras", atlikėjai iš Prancū-

BALTIAJ ESPERANTO TAGOJ-59 KAUNAS 2025

Baltijos šalių esperantininkų renginio emblema

dienoms išleistą žinyną, kitą atributiką. Nuolat veiks literatūros esperanto kalba kioskas.

Kauno turizmo informacijos centras "Kaunas In" specialiai renginio dalyviams esperanto kalba išleido labai informatyvų iliustruotą lankstinuką apie Kauną.

Visa programa vyks esperanto kalba.

Šios Baltijos esperantininkų dienos pasitarnaus plečiant kultūrinį bendradarbiavimą

## HODIAŬA PROGRAMO

**daŭrigo el p. 1**

| | |
|---|---|
| **15.00 – 16.00** | Prelego de d-ro Nijolė Žambaitė: "Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj" (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de Eŭheno Kovtonjuk: "La vivo kaj verkado de la blinda ukraina esperantisto Vasyl Eroŝenko" (*aŭditorio 403*) |
| **16.30 – 17.30** | Teatraĵo: *La Ŝaknovelo* de Stefan Zweig. Ludas Arno Lagrange (*Teatra salono, str. Daukanto 27*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **19.00 – 21.00** | Vespera koncerto de la pola grupo SuMi (*Granda salono*) |

## MORGAŬA PROGRAMO

**Mardo, la 8-a de julio**

| | |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: "Pri kio ni parolas kaj kiel? Ĝentileco internacie tra Esperanto" (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de prof. Mark Fettes: "Lingvo kaj tero" (*Senata salono*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Gražina Opulskienė: "Zamenhof kaj Litovio" (*aŭditorio 403*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Tim Owen: "Simboloj de Esperantujo" (*aŭditorio 401*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de István Ertl: "Spertoj de tradukisto – Kiel mi fariĝis maŝino" (*aŭditorio 212*) |
| **15.00 – 16.00** | Kantoateliero de Ĵomart kaj Nataŝa (*aŭditorio 306*) |
| **16.15 – 17.30** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Somero de Sigrid* (*aŭditorio 401*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de d-ro Gediminas Degėsys: "Nigra Afriko" (*aŭditorio 403*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de Sakari Kauppinen: "Tove Jansson – la patrino de Mumintroloj" (*aŭditorio 306*) |
| **16.30 – 17.30** | Koncerto de Marina Moritz (*Teatra salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **19.00 – 21.00** | Koncerto de JoMo (*Teatra salono*) |




# La solspektaklo de Arno Lagrange – hodiaŭ je 16.30

*La Ŝaknovelo* de Stefan Zweig, entenas aron da rakontoj enskatoligitaj unu en la alian. La ŝipa vojaĝo de Nov-Jorko al Bonaero dum kiu la personoj renkontiĝas ĉirkaŭ ŝakludado. La biografio de la monda ĉampiono, kiu kreskis kiel mensmalrapida kaj maldiligenta orfo, filo de danubaj boatistoj, edukita de pastro kiu malsukcesis instrui al li bazajn aferojn; tamen li montriĝis nevenkebla ŝakludisto kiu venkadis ĉiujn kontraŭulojn per peza kaj kvazaŭ aŭtomata ludado. Kaj fine la vivrakonto de Doktoro B. kvazaŭ similulo de la aŭtoro, viena prizorginto de la havaĵoj de la imperiestra familio, kiu estis devigata ekziliĝi el Aŭstrio post kiam nazioj aneksis la landon. Aldoniĝas la rakontisto kiu igas la Doktoron B. malkaŝi siajn travivaĵojn kiel speciala kaptito de la nazioj kiuj penis trudi ke li sciigu kie kaŝiĝas la havaĵoj de la imperiestra familio. Dum lia kaptiteco en plena izolo li hazarde trafis libron pri ŝakludo per kiu li ektrejnis ludi sola, unue reludante partiojn de majstroj, poste ludante mense ambaŭ kampojn – la nigran kaj la blankan – ĝis freneza krizo. La fadenoj de ĉiu el tiuj rakontoj interplektiĝas, tuŝante ekstremajn limojn de homaj mensaj kapabloj. **La solspektaklo de Arno Lagrange surbaze de *La Ŝaknovelo* de Stefan Zweig – hodiaŭ je 16.30 en la Teatra salono.**

FINANCA SUBTENANTO DE BET-59

iniciatyvos KAUNUI

## FOTOJ DE LA TAGO

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



En la Esperanto-kurso de Nina Pietuchowska.



Dum la akcepto de la rektoro.

# Venu al la kantoateliero, kunkantu en la koncerto!

Per kantoateliero ni celas prezenti kelkajn niajn kantojn por la partoprenantoj kaj prepari la dezirantojn por kunkantado dum nia koncerto. Ni ege ŝatus, ke la publiko dum la koncerto apogu nin en kelkaj kantoj kaj la kantoateliero estus bona ebleco prepariĝi por tiu celo. Venu **morgaŭ je la 15-a horo** kun skribilo kaj papero al la aŭditorio 306.

**Ĵomart kaj Nataŝa**

**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me**
Kontaktu la redakcion ankaŭ per SMS aŭ unu el la poŝtelefonaj aplikaĵoj: WhatsApp, Telegram aŭ Signal:

✆ **+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025